

Esperanto 272 aktuell



41. Jahr (2022) №2 (272)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



"Degode-Haus" en Oldenburg, la loko de la venonta Germana Esperanto-Kongreso.

Germana Esperanto-Asocio: Tätigkeitsbericht 2021. Bericht der Rechnungsprüfer des Deutschen Esperanto-Bundes für das Jahr 2021. D.E.B.-Haushaltsplan 2023.

Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 5. Juni 2022 in Oldenburg.

·kune· – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Deklaro pri solidareco kun Ukrainio.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotizoj kaj donacoj)
/ **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge
und Spenden): HELADEFIERB,
Sparkasse Odenwaldkreis,
DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den
D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: **Elke Mondorf**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

gea.oficejo@esperanto.de

Membroprozorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine
andere Anschrift angegeben, an die
Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch
weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-
Durchwahlnummern** sind nach der
Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / **retmesaĝo** al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell
erreichbar per E-Post-Adresse in der Form
vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg, Durchwahl -5125

Suborganizo / Unterorganisationen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj/Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier: Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211

michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/Presse und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter

für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,

gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engeländer, Durchwahl: -5127

goar.engelaender@esperanto.de

Mediinecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

mediinecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,

Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de.

www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

**Vertreter des DEB in der EEU-
Versammlung/Reprezentanto de GEA en la**

assembleo de EEU: Klaus Leith

klaus.leith@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj

kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,

die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)

1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

biblioteko@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart
eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz

1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@](mailto:plansprachen@onb.ac.at)

onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/

plansprachen/index.htm

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-
beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel.

+43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,

42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kroppenber (Mediinecho),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2022/3 ĝis

la 15-a de majo 2022. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2022/2 bis zum 15. Mai 2022.

Paperbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

„Malmulto dependas de ni, eble eĉ nenio. Sed la ideo mem de Esperanto estas mondopaco kaj interkompreniĝo. Ideo de Esperanto estas nek milito, nek speciala operacio de (ajna) armeo“. Tion skribis Grigorij Arosev, eksa prezidanto de Rusia Esperanto-Unio en artikolo por „Libera Folio“. Mi citas lin, ĉar li bone esprimas kion multaj el ni sentas ekde kiam la rusia armeo atakas kaj invadas la najbaran landon. Tondraj deklaroj je nia nivelo ne multe helpas en la nuna situacio (mi skribas ĉi tiun leteron la 12-an de marto). Mi tuj post komenco de la milito kontaktis la prezidanton de nia ukraina partnara asocio, kaj la GEA-estraro deklaris sian pretecon organizi helpon por tiuj ukrainaj esperantistoj, kiuj venas al Germanio inter la milionoj da rifuĝantoj.

La situacio estis ne imagebla ĝis antaŭ kelkaj semajnoj. Ĝi memorigas la leteron de L.L. Zamenhof al la diplomatoj el la jaro 1915: liajn rekomendojn por la tiama postmilita ordo, kiun li mem ne ĝisvivis. Kion ni povas fari? Bona iniciato estas la „helpo-servo de UEA kaj TEJO responde al la milito en Ukrainio“ (*Gazetara Komunikado de UEA n-ro 1026, 3-a de marto 2022*¹⁾). Ĝi listigas plurajn eblajn agadkampojn. Al ĝi ankaŭ GEA anoncis sian pretecon helpi. La kontaktpersonoj estas niaj estraranoj Andreas Emmerich kaj Barbara Brandenburg. Mi scias, ke pluraj el ni krome jam kunlaboras en lokaj neesperantistaj iniciatoj.

Esperantistoj en Ukrainio malmultas. La milito kaj ĝiaj sekvoj trafas ne nur ilin, sed ankaŭ niajn samideanojn en Rusio, baldaŭ komplete izolita lando. En iliaj retaj forumoj komenciĝis akra debato. El aliaj fontoj mi aŭdis pri forta premo ne nur ne distanci sin de la milito (kion

5 kuraĝuloj inter la rusiaj esperantistoj riskis fari), sed eksplicite deklari siajn lojalecon kaj subtenon por la armita interveno. Por la rusiaj esperantistoj difinigi sian pozicion fariĝos eĉ pli malfacile, ol dum la jaroj de la malvarma milito. Estas tro frue imagi, kiujn sekvojn tiu milito havos por la internacia Esperanto-kunlaboro. Sekvojn ĝi sendube havos.

Nia eta movado en Germanio ne kunrolas en historiaj eventoj, sed klopodas normale funkcii sub la pandemiaj kondiĉoj. Antaŭ kelkaj semajnoj ni devis jam la trian fojon nuligi nian printempan familian renkontiĝon PSI. Nuligoj fariĝis trista rutino, tial ni nun almenaŭ ne plu devas timi pri jam farita antaŭpago (kiel antaŭ du jaroj). Sed kreskas la risko, ke perdiĝas tradicioj kaj la klientaro, pri kies partopreno ni dum multaj jaroj povis kalkuli. Ĉi-foje eĉ ne estis limigoj flanke de la PSI-ejo en Braunschweig, kiuj kondukis al la nuligo. Simple la nombro de aliĝoj estis multe tro malgranda. Homoj evidente hezitas, eĉ se ni povas certigi plenan repagon de antaŭpagitaj kotizoj.

Kutime la viruso malpli furoras dum la someraj monatoj. Restas do la espero, ke nia kongreso en Oldenburg dum pentekostaj povos okazi kiel ĉeesta evento. Por tiu evento la aliĝado ĝis nun tre bone evoluas (jam estis pli ol cent aliĝintoj fine de februaro). Ni kongresos kune kun la nederlandaj geamikoj en la kadro de la komuna *Erasmus+*-projekto pri la temo „daŭripovo“, kiu ja malgraŭ ĉio restas aktuala.

El alia *Erasmus+*-programo GEA ankaŭ denove povos doni vojaĝstipendiojn por partopreno en klerigaj aranĝoj (ekzemple kursoj) en EU-eksterlando. La procedo postulas pli da burokrataĵoj ol ĝis nun (interkonsentojn pri lernceloj kaj lern sukcesoj), sed kun iom da imagokapablo kaj aldona laboro ni espereble superos ankaŭ tiun obstaklon. Ni jam havas plurajn kandidatojn por la Baltiaj Esperanto-Tagoj en Klaipeĉa kaj la Itala E-Kongreso en Brescia, sed eblas subvencii ekzemple ankaŭ la vojaĝon al kursoj en Grésillon aŭ al la Franca E-Kongreso en Trélissac (Périgord). Se vi interesiĝas, turnu vin al mi.

Amikajn salutojn

Ulrich Brandenburg

Enhavtabelo/Inhalt

1: "Degode-Haus" en Oldenburg, la loko de la venonta Germana Esperanto-Kongreso.

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4: Interkultura Centro Herzberg: Tutlanda gazetara kampanjo je favoro por Esperanto. Forpasis Dieter Dungere (1943-2022).

5-8: Aŭstria Esperanto-Federacio: Nova estrarano de AEF prezentas sin. Boltzmann, la germana profesoro. Esperanto en Londono. Der erste Esperantist, der heilig gesprochen wird. Andrea Sochurek: 04.09.1962-18.01.2022. Rakonto pri vojaĝo tra la tempo, parto 3. Neuer D.E.B.-Kanal bei YouTube - Hilfe willkommen!

9-18: Germana Esperanto-Asocio: Tätigkeitsbericht 2021. Mit *Erasmus+* beschert dem D.E.B. einen unerwartet hohe Jahresabschluss 2021. Bericht der Rechnungsprüfer des Deutschen Esperanto-Bundes für das Jahr 2021. Vergleich D.E.B.-Haushaltsplan 2021 zum Ist am 31.12.2021. D.E.B.-Haushaltsplan 2023. Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes am 5. Juni 2022 in Oldenburg (Oldb).

19: Publika agado: Für die Anerkennung des Esperanto als Sprache. Für die Anerkennung der Esperanto-Kultur.

20-21: Medienecho.

22: El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 65 – Alle Jahre wieder ... gibt es einen Geschäftsbericht der Bibliothek.

23: Novaperinta libro: Ein Thriller macht Lust auf Esperanto.

24: El la landaj kaj fakaj ligoj: Sukcesa donackontrakto inter la Esperanto-Klubo Munkeno kaj la Bavara Ŝtata Biblioteko.

5-9: ~~kune~~ – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Enkonduke. O-Stern. Deklaro pri solidareco kun Ukrainio. La homa esenco laŭ Hobbes kaj Rousseau. Kommende Veranstaltungen. Meine erste Sitzung als TEJO-Komitatano. Fahrtkostenzuschüsse. Jahresbericht 2021

32: Aliĝilo: la 10-a EMA 2022.

1) Rete: mallonge.net/helposervo aŭ <https://uea.org/gk/1026>

Tutlanda gazetara kampanjo je favoro por Esperanto

Ni ĝojas, ke la bona kaj konstanta kunlaborado inter Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo kaj Esperanto-Centro Herzberg havas bonajn rezultojn.

Jam okaze de pluraj gravaj Esperanto-eventoj, kiel inaŭguro de Esperanto-urbo, starigo de Zamenhof-monumento, enkonduko de Fondaĵo Esperanto-urbo, ktp. ni informis la gazetaron, radio- kaj kelkajn televidkanalojn. Dank' al tio ne malofte aperis gazetartikoloj, ofte kun fotoj. Malgraŭ klopodoj, multaj, ĉefe junaj kaj mezaĝaj homoj en la tuta mondo ankoraŭ ne aŭdis aŭ scias nur malmulte pri la internacia lingvo Esperanto.

Nun eĉ nin surprizis, ke dum la monatoj januaro kaj februaro 2022 okazis eksterordinara, pozitiva, vasta, eĉ tutlanda gazetara kampanjo.

Imagu, en ĉirkaŭ 60 % el ĉiuj germanaj gazetoj kaj retkanaloj nun aperis sufiĉe longaj gazetartikoloj pri Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo kaj pri Esperanto ĝenerale. Ofte la gazetartikoloj estis kune kun foto aŭ eĉ kun du malsamaj fotoj.

La instigo venis i.a. danke al vizito de gazetara redaktoro kune kun fotistoj de Germana Gazetara Agentejo (DPA). Nia nova urbestro de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, sinjoro Christopher Wagner mem (kune kun Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar) faris en januaro komunan rondiradon tra la unika Esperanto-urbo kaj informis la ĵurnaliston, klarigis al li multon rilate al Esperanto. Evidente ankaŭ la jam kelkcent publikaj ŝildoj, voĵmontriloj, inform-tabuloj, ktp. en la germana kaj en Esperanto instigas fotistojn kaj redaktorojn starigi demandojn pri la Internacia Lingvo.



De dekstre: redaktoro de DPA (Germana Gazetara Agentejo), la nova Esperanto-urbestro Christopher Wagner kaj Peter Zilvar de Germana Esperanto-Centro. Foto: Zsófia Kóródy.

Ĉi-foje en kelkaj gazetoj, eĉ en Süddeutsche Zeitung (Munkeno kun grandregiono) aperis tri diversaj artikoloj pri la jam fama Esperanto-urbo. Krom ĝenerala artikolo kun fotoj ekz. kun la dulingvaj voĵmontriloj kaj fotoj de la urbestro, ktp. aperis ampleksaj artikoloj danke al kromaj intervjuoj senpere de nia nova urboĉefo mem. Ofte la ĵurnalistoj starigis tiklajn demandojn, tamen nia urbestro jam bone majstris la situacion. En la plej multaj famaj kaj regionaj germanaj gazetoj aperis sufiĉe longaj, eĉ du- aŭ trikolumnaj artikoloj.

Ampleksaj artikoloj aperis krom en tagĵurnaloj ankaŭ en multaj fakgazetoj, ekz. pri vojaĝoj kaj geografio, krome raportis eĉ retkanaloj, ktp. Ankaŭ radiokanaloj interesiĝis, do intervjuojn donis Christopher Wagner, Michaela Stegmaier kaj Petro Zilvar.

La germana televidkanalo SAT1 produktis filmeton kaj intervjuis la urbestron en la urbodomo kaj Petro Zilvar, ekzemple sur la ĉef-placo kaj en la muzeo de la Welf-kastelo ĉe la Esperanto-fakekspozicio. Kiel ĉen-serio, daŭradas la aperigoj de artikoloj ankaŭ en landaj, regionaj kaj urbaj gazetoj.

En marto vizitos nin radiostacio kaj retkanalo eĉ el fora Aŭstralio. Tia granda informagado normale ne estas organizebla kaj tute ne pagebla. Pli kaj pli da homoj rimarkas, ke Esperanto estas moderna, publika kaj vivanta komunikilo, legantoj espereble konsciiĝos, ke la lingvo vivas ne nur en Herzberg kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ en aliaj regionoj.

La subskribita konstanta partnereckontrakto inter la urba administracio (tiama urbestro Gerhard Walter) kaj la gvidanto de la Esperanto-Centro (Peter Zilvar) antaŭ preskaŭ dek ses jaroj (post longa laborado) estis kaj estas fruktodona kaj konstante helpas al ambaŭ flankoj.

Petro Zilvar

Forpasis Dieter Dungert (1943-2022)

Dieter Dungert naskiĝis en la urbo Magdeburg. Post la studado de Kemia Teknologio li laboris en entrepreno, kiu okupiĝis pri produktado de lakoj kaj farboj en Magdeburg.

Meze de la 60-aj jaroj li esperantistiĝis. Komence de la 70-aj jaroj li organizis instruadon de Esperanto en Magdeburg. Longjare li mem instruis Esperanton en la popola altlernejo de Magdeburg kaj enkadre de Kulturligo de GDR, sekcio Esperanto. Paralele kaj poste li gvidis telestudadon pri Esperanto por interesitoj el la regiono.

Li estis longjara redaktoro de la loka Esperanto-gazeto „Magdeburga Folio“. Dieter Dungert mortis la 28-an de februaro 2022. Niajn sincerajn kondolencojn al la familio.

Andreas Diemel



Nova estrarano de AEF prezentas sin

Kion havas la subskribo de la Traktato de Aachen, la premiero de Turandot, kaj la naskiĝtago de Gotthold Ephraim Lessing komune?

Pli, ol vi pensas. Ĉio de tio okazis la 22-an de januaro. Kaj ekde la 22-a de januaro 2022, nova ulo hantis la estraron de la Aŭstria Esperanto-Federacio: mi.

Kelkaj faktoj pri mi. Mia nomo estas Franz-Joseph Geidel; mi havas sangotipon 0+, korpomasan indicon de 29, kaj estas esperantisto ekde 2005 (kio ne signifas, ke mi ne devus daŭre plibonigi mian Esperanton). La fatalan datrevenon de mia naskiĝo oni festas la 4-an de majo; mi naskiĝis en Germanio en 1990, duontempe inter la Falo de la Muro kaj la Germana Reunuiĝo, kiel filo de Orientaj Germanoj kaj frato de du pli maljunaj fratinoj.

Dum mia ĝisnuna vivo, mi restis ses jarojn en Germanio, dekdu en Aŭstrio, kaj dektri en Hungario. Ankaŭ mi studis la kulturon de Hungario je la Universitato de Vieno. Do, oni povas diri ke mi sufiĉe bone konas lingvojn, kulturojn kaj sociojn de gravaj eroj de Meza Eŭropo. Mi bone komprenas la pensmanierojn kaj vivmanierojn de kaj Hungaroj kaj Aŭstroj.

Profesie, mi estas sekretario en kuracista kabineto; ankaŭ, mi laboras multe sensalajre je kelkaj institucioj de Caritas, kaj ankaŭ kreema skribado interesas min delonge. Miaj du unuaj libroj aperos en majo, respektive en aŭgusto de 2022. Mi ankaŭ verkis por kultura gazeto de 2004 ĝis 2015, kies ĉefredaktoro mi estis dum ok jaroj. Mi volas ne nur informi homojn, mi ankaŭ volas amuzi ilin, do mi estas regulara kontribuanto al Kontakto. Pasinteco mi ankaŭ skribis slapstikon, sed mi avertu vin; legado de tiaj tekstoj povus okazigi freneziĝon de vi.

En mia libertempo, mi estas radioamatoro, mi ŝatas solvi la Kubon de Rubik, kaj foje mi forflugas pere de mia flugsimulilo. Mi ankaŭ ŝategas ridigi homojn; antaŭ la kronviroza krizo komencis, mi foje aperis kiel magiisto, ventroparolisto, kaj komikulo. Je la universitata sportinstituto, mi studis treaĵon, judon, kaj unu semestron da klaŭnado.

Mia fianĉino ne nur estas la plej aminda estaĵo surtere, ŝi ankaŭ estas Esperantistino. Kaj ŝi ege helpas min agi en la E-movado.

Ekde 2014, mi okazigis lernorondojn, ĉefe por gejunuloj, en Vieno. Unue, ni renkontiĝis en fama (ĉar bongusta kaj preskaŭ nekredinde malmultekosta) picejo Mafiosi en la 15-a distrikto de Vieno. Poste, ni ŝanĝis la ejon al gastejo Centimeter VII.



Rapide mi komprenis, ke kelkaj partoprenantoj ne celis vere plibonigi sian Esperanto-scipovon, sed venis ĉefe pro la malmultekosta biero. Tio pruviĝis ĝuste dum la Kronviroza Ŝtopado. Mi elektis Zoom konferencojn kiel medio de lernado tiam. Kaj malgraŭ mia longega tempo de preparadoj, mi estus devinta ĝoji se nur kvar aŭ kvin samideanoj alvenis. Mi preparis Keynote prezentadojn kotizante almenaŭ kvin horojn de laborado. Do, ne daŭris longe ĝis mi perdis mian paciencon kaj frustrite decidis haltigi la lernorondon.

Sed mi lernis de tiu situacio. Je universitato, mi vizitis la kurson Merkatado kaj Novigado, gajnigante la gradon „bone“, kio instruis min: Ne sufiĉas la ebleco por homoj aĉeti vian

varon. Ili bezonas la devigon voli ĝin. Tio okazigas, ke mi nun traktas la aferojn holisme. Ekzemple, lernomaterialoj devas esti praktike por la vivo, ne nur interese. Se homoj scias, ke la frazoj, kiujn ili lernas, povas esti helpantaj en la ĉiutaga vivo, ili komprenas la utilecon de Esperanto multe pli bone. (Tial mi ankaŭ oftege parolas en Esperanto kun mia fianĉino.)

Sed ni ankaŭ devas paroli pri la malsukcesoj en la E-movado. Mi vidas, ke cirkulas novaĵoj pri la „ekstraordinara populareco“ de Esperanto. Sed mi devas konfesi ke mi kontraŭdiras. Mi timas, ke Esperanto estas en krizo hodiaŭ. Eĉ la Esperanto-Vikipedio ne taŭgas ŝanĝi tion. Dum ĝi havas egan amason da artikoloj,

informi sin pere de ĝi estas nerealisme. Kreskado de la artikolaro okazas koste de la kvalito kaj enhavo. La plejmulto de artikoloj estas ĝermoj, do, artikoloj tiom mallongaj ke oni lernas preskaŭ nenion de ili.

Ni devas agi kune kaj saĝe. Kune, ĉar nur kiel Esperantistaro ni estas fortaj. Saĝe, ĉar ni devas obei la gravajn ecojn de merkato se ni volas atingi disvastigon de Esperanto. Ekzemple, mia fianĉino kaj mi dezajnis kaj publikis flugfoliojn pri nia lernorondo. Sed ni financis tion el nia propra poŝo.

En Pizzeria Mafiosi, ni estis proksimume 10 partoprenantoj; en gastejo Centimete

r VII, nur plu ses aŭ sep. Kaj dum „hejma oficeja“-tempoj, tiu numero malkreskis en la direkto de preskaŭ nulo. Estas pli ol ŝajne, ke malmultekosta biero estas pli grava por kelkaj ol la lernado de Esperanto.

Sed ni havas cerbojn. Ĉiuj de ni portas Esperanton en la koro. Ni scias kiel transdoni la entuziasmon pri la internacia lingvo. Mi pensas, ke kune ni povas ne nur lasi la homojn „gustumi“ Esperanton. Saĝe agante, ni atingos, ke niaj lernantoj restos ĉe ni, malkovrante la utilecon, atingante veran kreskon de la granda rondo familia. En aprilo de 2022 nia lernorondo re-komencas – kaj ni elektis gastejon ege taŭgan por lerni, kun bongustaj manĝaĵoj, trankvila atmosfero kaj prezoj ne pli altaj ol aliloke. Per tio ni celas al lernantoj emaj por lerni, ne por ĉipa biero. Ni renkontiĝos du-semajne (en paraj semajnoj), merkredvespere je la 19-a horo. Ĉu vi havas intereson? Nepre skribu al mi:

eo_wien@yahoo.com

Kun amikegaj salutoj

Franz-Joseph


Esperanto en Londono

Post mia lasta artikolo por la 270-a eldono de *Esperanto aktuell*, en kiu mi raportis pri mia translukiĝo al Britio kaj mia Esperanta lernado ĉi-tie, mi ĝojas, ke mi havas la ŝancon denove verki kontribueton.

Ekde mia teksto antaŭ kelkaj monatoj multo okazis: Do mi povis kadre de mia „Gedenkdienst“ (Aŭstra Holokaŭsta Memorservo) subteni mian organizon „Holocaust Memorial Day Trust“ (HMDT), por kiu mi laboras unu jaron, dum la Internacia Tago de Holokaŭsta Memoro. Mi ekzemple helpis per historiaj aŭ politikaj esploroj kaj faris diversajn administrajn kaj komunikajn laborojn. La Internacia Tago de Holokaŭsta Memoro okazas ĉiujare la 27-an de januaro, je la datreveno de la liberigo de la koncentrejo kaj ekstermejo Auschwitz-Birkenau en 1945. La brita ceremonio por la Tago de Holokaŭsta Memoro organizita de HMDT memorigas pri la milionoj de viktimoj de la holokaŭsto, naziisma persekutado kaj la viktimoj de la postaj genocidoj en Kamboĝo, Ruando, Bosnio kaj Darfuro. Inter la milionoj kiuj perdis siajn vivojn dum la holokaŭsto ankaŭ troviĝis multaj parolantoj de Esperanto, inter alie familianoj de L.L. Zamenhof kiel Lidia Zamenhof. Bonvolu legi pli da informoj pri la persekutado de Esperanto en Nazia Germanio kaj Lidia Zamenhof en la mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro: <https://uea.org/gk/1010>.

Krom mia interesa kaj defia laboro kun HMDT, pro kiu mi estas tre dankema ke mi povas subteni ĝin, mi nun ankaŭ estas en kontakto kun TEJO, kies laboro ĉe la Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj UNESCO tre interesas min, kaj daŭre kun la Londona Esperanto-Klubo (LEK). Kaj ekde Februaro 2022 mi partoprenas bonegan Esperanto-kurson de LEK, kiu okazas ĉiusemajne rete kun malgranda motivita grupo. Estas avantaĝo de la Zoom-kurso, ke partoprenantoj el la tuta mondo havas la ŝancon ĉeesti.

Felix Baur,
Londono, Marto 2022



Der erste Esperantist, der heilig gesprochen wird

Am 15. Mai 2022 wird Papst Franziskus in Rom den Karmeliterpater und Universitätsprofessor Titus Brandsma heilig sprechen.



Er wurde am 23.2.1881 als Anno Sjoerd Brandsma in Ugokloster bei Bolsward in der niederländischen Provinz Friesland geboren und starb am 26.7.1942 im KZ Dachau. Der Priester, Journalist, Esperantist und frühe Warner vor dem Nationalsozialismus wurde im November 1985 von Papst Johannes Paul II. selig gesprochen.

Titus Brandsma war Esperantist und Mitglied der Internationalen Katholischen Esperanto-Vereinigung (IKUE). Beispielsweise in den Jahren 1926, 1928, und 1931 bis 1932 erschienen sein Name und seine Adresse im Jahrbuch der katholischen Esperantisten. Brandsma leistete Pionierarbeit in der Organisation und Leitung der katholischen Journalisten und in der ökumenischen Bewegung. Bei diesen Tätigkeiten nutzte er auch Esperanto.

Trotz schlechter Gesundheit war er immer gut gelaunt. In den Niederlanden war er einer der ersten, der vor der NS-Diktatur warnte. Sowohl in Artikeln als auch bei Predigten und im Unterricht verurteilte er die Verfolgung der Juden.

Im Auftrag der Bischöfe ermutigte er nach der Besetzung der Niederlande durch Deutschland die katholischen Journalisten, NS-Propaganda in ihren Zeitungen abzulehnen.

Deshalb wurde er von der Gestapo verhaftet und am 19.6.1942 ins KZ Dachau eingeliefert. Hier musste er härteste Zwangsarbeit leisten und wurde oft ganz unwürdig und gemein misshandelt. Schon nach einem Monat war er völlig entkräftet.

Im Krankenrevier verabreichte ihm eine Krankenschwester am 26.7.1942 eine tödliche Karbolsäure-Spritze, eine Routinehandlung, welche die Schwester schon hunderte Male ausgeführt hatte. Sie sollte sich erinnern, „dass es ihr für den Rest des Tages schlecht ging“.

Die Frau, die ihm die „Gnadenspritze“ gab, bekehrte sich danach, weil sie in ihrem Innersten, ohne dass sie es wollte, von den Worten getroffen wurde, mit denen er die Misshandlungen ertrug: „Vater, nicht mein Wille geschehe, sondern der deine“. Sie berichtete, dass die Kranken sie normalerweise hassten und mit Schimpfwörtern belegten und

sie diesen Hass aus vollem Herzen erwiderte. Wie geschockt war sie dagegen, als der alte Priester sie stattdessen mit dem Zartgefühl und der Achtung eines Vaters behandelte: „Einmal hielt er meine Hand fest und sagte: „Was bist du für ein armes Mädchen, ich bete für dich!“

Von seinen Folterknechten hatte Titus Brandsma immer gesagt: „Auch sie sind Kinder des lieben Gottes, und vielleicht bleibt in ihnen noch irgendetwas...“

Diese Krankenschwester erklärte beim Seligsprechungsprozess, dass das Antlitz dieses alten Priesters sich für immer in ihr Gedächtnis eingepägt hatte, weil sie in ihm etwas gelesen hatte, das sie nie gekannt hatte. Sie sagte schlicht: „Er hatte Erbarmen mit mir!“

Karl Reinisch, 2022-03-13

Rakonto pri vojaĝo tra la tempo, parto 3

Temas pri daŭrigo de la teksto, kiu aperis sur la paĝo 7 en *Esperanto aktuell* 2021/6.

Estis granda kaj profunda kanjono tie. Tie oni malsupreniras.

Oni devas iri piede ĉar tie estas nek rulŝtuparoj, nek liftoj.

Ne estis facile supreniri. Tie estis vere multaj homoj. Sur iu loko oni vidis ruĝan flagon. Ekde tiu ĉi flago vi perdas vian signalon.

Kiam mi alproksimiĝis al la flago, la homoj de la centralo vokis min kaj diris al mi ke mia signalo estas perdita kaj ke mi devas ŝanĝi mian lokon, ĉar se io okazos kun mi, ili ne povos helpi al mi.

Se mi traŭros al la alia flanko, mi havas la rajton esti sen signalo dek minutojn. Post dek minutoj ili sendas sian ekipon por trovi min. Ili kredas ke vi foriris en iun de tiuj rezervejoj. Mi trapasis tiun linion. Ho, kia sento estis tio...

Mi devas diri ke mi vidis ĉion tie. Unu viro tie laŭte kriis: "Mi amas vin! Mi amas vin plej multe en la mondo!" Mi komprenis ke ili laboras kune, sed li ne rajtas diri al ŝi ke li amas ŝin, ĉar intimeco inter dungitoj estas strikte malpermesita, kaj tial li venis al tiu loko por diri al ŝi kiom li amas ŝin.

La maniero kiel li parolis pri ŝi, estis tre kortuŝa.

"Mi pensas ĉiam pri vi kiam mi iras dormi," daŭrigis li. "Se mi malfermas miajn okulojn, via vizaĝo konstante estas antaŭ miaj okuloj. Mi ne povas ne pensi pri vi. Vi estas mia amo, vi estas ĉio por mi. Mi amas vin plej multe en la mondo, mian vivon mi donus por vi."

Ne malproksime de tiu ĉi viro estis alia viro kiu kriis: "Mi malamas vin! Mi malamas vin plej multe en tiu ĉi mondo!"

Mi havis la senton ke tie temas pri lia bopatrino. La kompatindulo laŭte malbenis.

Iuj homoj kverelis, iuj preĝis al Dio. Mi venis por preĝi al Dio.

Mi vidis kelkajn homojn genui kaj kunigi la manojn. Mi ne sciis kiel oni faras tion, sed mi decidis fari tiel kiel mi vidis de aliaj. Mi kunigis la manojn kaj komencis preĝi al Dio, la unuan fojon. Mi vere preĝis kaj malfermis mian animon. Miaj larmoj komencis gliti sur miajn vangojn. Estis kiel digo, kiu baris la fluon de la akvo dum mil jaroj, kiu krevis, kaj la ellasita akvo finfine fluis.

Mi ploris kaj ploris tiel, ke mi tute forgesis ke ĉirkaŭ mi estas homoj. Mi memoras ke mi tenis teron en miaj manoj. Mi ne scias kiam kaj kiel, sed inter miaj fingroj estis tero. Tiu tero estis malseka, preskaŭ koto.

Feliĉe mi sonigis la alarmon por rememorigi min pri la ekvalidiĝo de tiuj damnitaj dek minutoj. Mi revenis, apenaŭ regante min. Estis vere malfacile, sed mi sentis min

Andrea Sochurek 04.09.1962 – 18.01.2022



La 18-an de januaro 2022 nia koleginino Andrea Sochurek subite kaj tute neantaŭvideble elmondiĝis.

Ekde decembro 2006 ŝi laboris kiel bibliotekistino kun granda engaĝiĝo en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Ŝia entuziasmo pri Esperanto jam ekis pro kurso en la jaro 1990, kiun ŝi partoprenis aldone al

siaj universitataj studoj pri historio, filozofio kaj germana literaturscienco.

Andrea Sochurek elstaris pro ŝia granda servemo kaj aparta komplezo por homoj. Tion spertis ne nur ŝiaj kolegoj, sed ankaŭ la vizitantoj dum ŝiaj informservoj en la Esperantomuzeo kaj en la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj.

Ekde 2007 Andrea Sochurek gvidis multajn grupojn tra la Esperantomuzeo, kiujn ŝi ĝojigis pro siaj kompetenteco kaj humoro. Inter 2007 kaj 2011 ŝi intense laboris pri projektoj rilate la plibonigon de la katalogo Trovanto. Ekde 2008 unu el ŝiaj ĉefaj laboroj estis la ordigo kaj katalogado de pluraj ege ampleksaj postlasaĵoj, inter aliaj jenaj de Andreas Juste (1918-1998), Jacques Bol (1922-2009), Kálmán Kalocsay (1891-1976), kaj ekde 2021 la ampleksa arkivo de la eldonisto Juan Régulo Pérez (1914-1993). Kiel faka ekspertino ŝi ankaŭ respondecis pri la disdono de la germanaj kaj Esperantaj terminoj en la katalogo Trovanto kaj ŝi laboris en la tiel nomata transbiblioteka "Komuna Norma Datumaro" (Gemeinsame Normdatei), kiun ŝi pliriĉigis per informoj precipe pri Esperanto-verkistoj.

La Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj perdas aparte afablan, serveman kaj diligentan kunlaborantinon. Ŝia subita elmondiĝo doloras. Ŝiaj grandaj engaĝiĝo, scio kaj amikemo mankos.

Bernhard Tuider

plena de nova energio. Tamen, tiom ofte mi rezignis mense. Mi ne povis koncentriĝi pri mia laboro. Mi pensis pri mia destino, pri mia ekzisto, pri mia vivo kaj pri multaj aferoj.

Ili vokis min plurfoje por konversacio en laboro, kaj ili diris ke mi ne estas plu efika. Ili demandis min, kio ĝenas min. Mi diris al ili ke mi ne ŝatas la ĉambron en kiu mi laboras. Ke mi bezonas ion malfermitan, ion alian kie mi povus esti pli libera. Mi ne sciis ke mi ne rajtas uzi tiun vorton. Ili translokigis min tiun saman tagon.

Mi laboris kiel inĝeniero. Pli malpli ni ĉiuj estas inĝenieroj de robotiko.

Mi estis en la sektoro en kiu oni studis naŭtikon. Temis pri la malkovro de la granda fendeto kaj pri kio ĉio troviĝis en ĝi. Naŭtiko multe progresis kaj la plej grandaj famuloj de la mondo okupis sin por konstrui specialajn robotojn kiuj iris al la profundo sen homoj. Ili elfosis kaj esploris en la tero ĉion kion ili trovis en ĝi.

Neuer D.E.B.-Kanal bei YouTube - Hilfe willkommen!

Die GEA.IT-Kommission des D.E.B. (Kommission für elektronische Medien) beschäftigt sich mit der Nutzung von elektronischen Medien durch den D.E.B.

Einer der Informationskanäle, dessen Nutzung die Kommission intensivieren möchte, ist YouTube. Deshalb haben wir den neuen YouTube-Kanal "Deutscher Esperanto-Bund Sehenswertes" (<https://mallonge.net/YouTube-DEB-Sehenswertes>) eingerichtet. Hinweis: Wir verwenden deutschsprachige Namen, da wir hauptsächlich Anfänger ansprechen wollen.

In diesem YouTube-Kanal haben wir bereits existierende YouTube-Filme aus der Esperanto-Welt gesammelt und werden dies auch weiterhin tun. Wir haben diese gesammelten YouTube-Filme in sogenannten Playlists sortiert. Bis jetzt haben wir die folgenden Playlists erzeugt:

- Deutscher Esperanto-Bund Musik
- Deutscher Esperanto-Bund Sprache
- Deutscher Esperanto-Bund Esperanto-Kurse
- Deutscher Esperanto-Bund Filme
- Deutscher Esperanto-Bund Esperanto-Stadt
- Deutscher Esperanto-Bund Esperanto-Bewegung
- Deutscher Esperanto-Bund Europa
- Deutscher Esperanto-Bund Vorträge

Do, ĝi estis plej alte pagita kaj plej postulema laboro. Farante tiun ĉi laboron, mi plenumis mian liberan tempon. Se mi povus, mian tutan vivon, de komenco ĝis la fino, sen iu penso.

Nun mi demandas min: "Ĉu tio estas vivo?"

Do, mi iris al tiu konstruaĵo, profunde sub akvo. Mi ĝojis pri tiu beleco. Tie oni ne estas tiel rigora, oni povis havi iom da libereco. Tie la homo eĉ povus diri: "Dio helpu min," sen ke la krizservoj reagu.

En tiu ĉi loko mi konatiĝis kun viro, sed pri li mi daŭrigos poste.

...

Rakonto de la serba ortodoksa Patro Otac Predrag Popovic. Originala titolo: *Prica o putovanju kroz vreme.*

2022-01-15 Franziska Dodik

Deutscher Esperanto-Bund Coronavirus
Deutscher Esperanto-Bund Treffen

Deutscher Esperanto-Bund Wissenschaft
In diesen Playlists finden sich schon ca. 70 Video-Filme - schauen Sie selbst.

Und wie können Sie jetzt helfen? Wenn Sie interessante Video-Filme aus der Esperanto-Welt in YouTube kennen oder vielleicht zukünftig finden, können Sie - uns entweder die Links auf diese YouTube-Filme zusenden (an gea.youtube@esperanto.de) - oder sie in unsere Vorschlags-Playlist "_Proponoj" einsortieren, wie im Folgenden beschrieben.

Um die Sammlung von Vorschlägen innerhalb von YouTube zu vereinfachen, haben wir im D.E.B.-Informationskanal "Deutscher Esperanto-Bund Sehenswertes" die Playlist "_Proponoj" erzeugt, die per https://mallonge.net/YouTube-DEB-_Proponoj erreichbar ist. Um dort Filme zu platzieren, müssen sie zuerst - ein eigenes YouTube-Konto haben - damit in YouTube angemeldet sein und - den Anweisungen in https://mallonge.net/YouTube-Hilfe-_Proponoj folgen.

Die Variante mit der Playlist "_Proponoj" ist anfangs etwas schwierig zu verwenden, ist jedoch nach etwas Übung recht komfortabel.

Der D.E.B. bedankt sich bei denjenigen, die bereits geholfen haben und Vorschläge für interessante YouTube-Videos eingereicht haben.

Stefan Krieghoff für die GEA.IT-Kommission



Deutscher Esperanto-Bund e.V. Tätigkeitsbericht 2021

1. Einleitung

Ergänzend zu dem nachfolgenden Jahresbericht wird auf die regelmäßige Berichterstattung in der Verbandszeitschrift Esperanto aktuell verwiesen. Beiträge zu den Aktivitäten des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.), seines Jugendverbandes (Deutsche Esperanto-Jugend e.V.) sowie seiner Mitgliedsvereinigungen und -einrichtungen erschienen im Berichtsjahr in allen 6 Ausgaben der Zeitschrift.



Auch das Jahr 2021 war für den Deutschen Esperanto-Bund geprägt durch die Corona-Pandemie und die immer wieder verhängten Einschränkungen, die den Verband in seinem Kernbereich getroffen haben. Ein wesentlicher Teil seiner Arbeit besteht zu normalen Zeiten darin, internationale Verbindungen zu pflegen und dafür geeignete Foren zu bieten. Den Corona-bedingten Einschränkungen des Reiseverkehrs, Beherbergungs- und Versammlungsverboten sind leider auch im Jahre 2021 fast alle geplanten Veranstaltungen des D.E.B. zum Opfer gefallen. Lediglich der Verbandsrat in Osterode und die Herbstwanderung EMA entlang der Weinstraße fanden als Präsenzveranstaltungen statt, wenn auch ohne Beteiligung aus dem Ausland. Schwer getroffen waren auch Veranstaltungen der Landes- und Fachverbände sowie der Ortsgruppen, die auch im Jahre 2021 nicht regulär zusammenkommen konnten und zahlreiche Aktivitäten absagen mussten.

In einigen Fällen und mit zunehmendem Erfolg gelang es jedoch, Zusammenkünfte ins Netz zu verlegen und durch Videokonferenzen zu ersetzen. Dies gilt insbesondere für den seit langem geplanten gemeinsamen Kongress von Deutschem und Polnischem Esperanto-Bund sowie der Föderation von Eisenbahner-Esperantisten. Ein Nebeneffekt war die damit verbundene Erweiterung des Teilnehmerkreises: manche Gruppenabende konnten auf diese Weise Teilnehmer und Beiträge aus mehreren Kontinenten verzeichnen. Auf Bundesebene konnte die Verbandsarbeit durch regelmäßige Videokonferenzen aufrechterhalten werden. Als hilfreich erwies sich der weitere Ausbau der Arbeit im Bereich Informationstechnologien (s. unter 6.). Das Interesse an Esperanto-Kursen im Internet könnte durch den Lockdown sogar zugenommen haben. Es bleibt jedoch zu befürchten, dass durch den Wegfall persönlicher Begegnungen und den Ausfall traditioneller Veranstaltungen die Esperanto-Arbeit über Deutschland hinaus dauerhaften Schaden nimmt.

2. Bundesversammlung und Verbandsrat 2021 in Osterode

Die lt. Satzung mindestens einmal im Jahr einzuberufende Bundesversammlung des D.E.B. war für den gemeinsamen Kongress mit dem polnischen Partnerverband PEA und den Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) zu Pfingsten 2021 in Słubice/Polen vorgesehen. Dieser musste wegen der Pandemie ins Netz verlegt werden. Die Versammlung wurde daher wie im Vorjahr auf den Termin der langfristig geplanten Verbandsratssitzung (30.10.2021) verschoben und konnte - wenn auch mit verminderter Teilnehmerzahl - stattfinden. Erneut waren ca. ein Dutzend Mitglieder per Video zugeschaltet. Ergebnis der satzungsgemäß durchgeführten Vorstandswahlen:

- Ulrich Brandenburg, Vorsitzender (Wiederwahl)
- Andreas Emmerich, stellvertretender Vorsitzender (Wiederwahl)
- Dr. Matthias Hecking, Schatzmeister (Wiederwahl)
- Nils Brinkmann, Schriftführer (Wiederwahl)
- Franz Kruse, Vorstandsmitglied für Informationstechnologien (Wiederwahl)
- Andreas Diemel, Vorstandsmitglied für Ortsgruppen, Landes- und Fachverbände (neue Zuständigkeit)
- Barbara Brandenburg, Verwaltung (Wiederwahl)
- Michaela Stegmaier, Vorstandsmitglied für die mittlere Generation (neu gewählt)

Die Deutsche Esperanto-Jugend ist im Vorstand vertreten durch ihren Vorsitzenden Michael Vrazitulis. Als Vorstandsmitglieder ausgeschieden sind Wolfgang Bohr und Oliver Walz.

Lt. Satzung war einer von zwei Kassenprüfern neu zu wählen: Dr. Reinhard Fössmeier übernahm das Amt von Dr. Ulrich Ender, der nach zwei Amtsperioden nicht wiedergewählt werden konnte. Auf Grund der vorangegangenen Debatte im Verbandsrat verabschiedete die Bundesversammlung eine Entschließung zum Thema „Konferenz zur Zukunft Europas“, die allen deutschen Mitgliedern der Konferenz zur Kenntnis gegeben wurde. Ihr Text sowie das Protokoll der Bundesversammlung wurden in der Verbandszeitschrift Esperanto aktuell Nr. 6/2021 veröffentlicht.

Die üblicherweise in Herzberg stattfindende Tagung des Verbandsrats musste mangels Corona-gerechter Räumlichkeiten nach Osterode am Harz verlegt werden, konnte dort jedoch in Verbindung mit der Bundesversammlung regulär stattfinden. Der Verbandsrat (vgl. § 9 der Satzung) dient in erster Linie dem Erfahrungsaustausch mit den Landesverbänden und Fachorganisationen des D.E.B.. Inhaltlicher Schwerpunkt der Tagung 2021 war die Beteiligung

an der öffentlichen Konsultation im Rahmen der „Konferenz zur Zukunft Europas“ (s. Zf. 9). Weiteres wichtiges Thema war wiederum die Esperanto-Arbeit unter Corona-Bedingungen, insbesondere die Nutzung des Internets: Hierzu konnte auch praktische Beratung angeboten werden. Besprochen wurden darüber hinaus Vorschläge zur Betreuung der „mittleren Generation“ von D.E.B.-Mitgliedern und zum Übergang von der Esperanto-Jugend zur Erwachsenenorganisation.

3. Mitgliederentwicklung

Trotz einiger Beitritte im Berichtsjahr hat sich der schon seit Jahren zu beobachtende Trend eines leichten Rückgangs der Mitgliederzahl auch 2021 fortgesetzt. Mit Blick auf seine Altersstruktur steht der D.E.B. wie andere, vergleichbare Organisationen vor der Aufgabe, neue und insbesondere jüngere Mitglieder zu gewinnen. Das zunehmende Interesse an der Internationalen Sprache und die erleichterten Lernmöglichkeiten durch Internet-Sprachkurse haben bisher kaum zu einer gestiegenen Bereitschaft geführt, sich als Mitglied in einer Esperanto-Organisation zu engagieren: Der D.E.B. teilt diese Erfahrung mit seinen Partnerorganisationen überall auf der Welt. Nicht zuletzt aus diesem Grunde wurde die Position eines Vorstandsmitglieds für die mittlere Generation neu geschaffen. Wie in den Vorjahren reichen die Einnahmen aus Mitgliedsbeiträgen allein zur Finanzierung der Verbandsarbeit nicht aus (s. Bericht des Schatzmeisters); diese Lücke konnte 2021 nur durch Spendeneinnahmen, durch eine Zuwendung der Stiftung Deutsch-Polnische Zusammenarbeit für den gemeinsamen Kongress sowie durch Verwaltungskostenentgelte aus dem Erasmus+-Programm geschlossen werden.

4. Bundesvorstand

Der Bundesvorstand wurde im Berichtsjahr neu gewählt (s. Zf. 2). Als Vertreter der Deutschen Esperanto-Jugend (gem. § 8.2.d) der Satzung nahm der DEJ-Vorsitzende Michael Vrazitulis an der Vorstandsarbeit teil. Zum neuen Beauftragten für die Europa-Arbeit des D.E.B. und Vertreter in der Versammlung der Europäischen Esperanto-Union wurde Klaus Leith bestimmt. Eine aktuelle Übersicht aller Vorstandsmitglieder und Beauftragten findet sich jeweils auf Seite 2 der Verbandszeitschrift Esperanto aktuell. Aus Kostengründen und zur Zeitersparnis arbeitete der Vorstand wie bisher vor allem per Internet und mit 14-tägigen Videokonferenzen. Aus Corona-Gründen mussten die geplanten Sitzungen im März und zu Pfingsten ausfallen. Die Sitzungen am 4. September in der Berliner Geschäftsstelle und am 30. Oktober im Anschluss an die Bundesversammlung in Osterode konnten dagegen als Präsenzveranstaltungen stattfinden.

5. Verwaltung

Die Arbeitsschwerpunkte im Berichtsjahr lagen wie in jedem der vergangenen Jahre auf typischen Verwaltungsaufgaben. In enger Abstimmung mit der Geschäftsstellenleitung wurden Arbeiten am Verwaltungsprogramm (u.a. in Bezug auf Versand von Esperanto aktuell, Führung von Teilnehmerlisten, Geburtstagslisten usw.) durchgeführt. Darüber hinaus gab es folgende weitere Schwerpunkte:

Anhaltende Arbeiten im Bereich „Abgabe von Buchbeständen an die Staatsbibliothek Berlin“, Erstellung von Vorschlagslisten von Büchern zur Auswahl für die Staatsbibliothek Berlin, Anbieten und Abgabe von in der Staatsbibliothek nicht benötigten Titeln an weitere Esperanto-Bibliotheken, Weiterleiten von Zeitschriften, die an das DEB-Büro geschickt werden (Bestände des Vorjahres), Erweiterung des DEB-OPACs durch neue Bestände. Leider wird diese Möglichkeit, die eigenen Bestände sichtbar zu machen, von Esperantogruppen bisher wenig genutzt.

